de Ĉinio, vicprezidanto de la Asocio de ĉinaj eldonejoj, kiu siavice kontaktis la Ĉinan Esperanto-Eldonejon. Ties estraro akceptis eldoni la aktojn. Liu Ling estis respondeculo dum la tuta eldona kaj komposta laboro. Post la morto de Neergaard, Christer Kiselman transprenis (laŭ peto de Ivo Lapenna) la redaktan laboron kaj la kontakton kun Liu Ling. La elekto de artikoloj en la *Aktoj* estas do la rezulto de la kontaktoj de Neergaard, dum la postan redaktan laboron faris Kiselman. Liu Ling kaj liaj kunlaborintoj faris grandegan servon al la akademio.

La unua volumo de la *Aktoj de Akademio Comenius* aperis en 1992 - la jaro de la kvarcenta datreveno de la naskiĝo de Comenius. Ĝi enhavas dek kvin artikolojn pri diversaj temoj, ordigitaj en du partoj: parto humanisma kaj parto matematika-naturscienca. La prezidanto de la Ĉina Akademio de Sciencoj, Zhou Guangzhao, verkis antaŭparolon. La libro krome enhavas la statuton, la regularon pri voĉdonoj kaj liston de ĉiuj fondaj membroj. La libron publikigis Ĉina Esperanto-Eldonejo, kiu donace kompostis kaj presis ĝin.

La volumo enhavas XI + 118 paĝojn kaj estas distribuata de la Internacia Libro-Komerca Kompanio de Ĉinio (Guoji Shudian), Esperanta Sekcio, P. O. Kesto 313, Beijing 100044. Ĝia libra numero estas ISBN 7-5052-0042-9.

**Kio nun?**

Post la apero de la *Aktoj* la akademio ne faris multon. Fakte ĝi vegetas. Multaj el la membroj mortis. Kelkaj manuskriptoj alvenis por publikigo en la dua volumo de la *Aktoj*. Ni devas aŭ malfondi la akademion, aŭ alelekti novajn membrojn. Sed laŭ la ege striktaj reguloj estas malfacile fari tion.